



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 202

Februaro 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



## INTERESAJ ARGUMENTOJ EL *Ardes*

Redaktora noto: Lokan grupaninon, Marijo Graça, unue impresis ĉi tiu citaĵo el la fantazia romano ARDES\*, kiun ŝi prunteprenis el la loka Libraro Ludovika. Ardes estas la nomo de kvazaŭ-dia estaĵo kiu gvidas aron da turistoj tra la stranga 'Lando de Flamoj'. Tiun landon forte influas ses kvazaŭ-sunoj, kiujn oni nomas la Flamoj. La romano instigas la leganton al preskaŭ morala pensado pri diversaj konceptoj por anstataŭigi la influojn bonajn kaj malbonajn de la Flamoj. Ekzemple, la plej malbonema kaj kontraŭinda el la Flamoj, la Nigra Flamo, instigas la homojn al sentoj kaj agoj de egoismo, malamikeco, netoleremo kaj milito. Ĉi-tie mi decidis anstataŭigi la Nigran Flamon per la vorto Naciismo. Mi esperas, ke vi konsentas. En ĉi-tiu sceno, inĝeniero kiu konstruas aŭtobusojn gvidas la junajn geturistojn Olo, Ela kaj la aliaj al sia laborejo.



... Survoje, en malgranda ĝardeno ili vidis grupeton da homoj, kiuj sidis sur benkoj kun kajeroj sur la genuoj kaj kraĵonoj en la manoj. Juna homo faris al ili demandojn en iu lingvo, aŭskultis kaj korektis iliajn respondojn, montris al ili gumajn blovitajn bestojn – hundon, katon, elefanton – nomis ilin en sia lingvo kaj skribis tiujn vortojn sur malgranda tabulo, kiun tenis en la manoj juna virino.




– Kion ili faras? – demandis Olo al la inĝeniero.

– Ha, mi ofte vidas ĉi tie tiujn strangulojn, – respondis tiu. – Ili lernas iun al neniu bezonatan misan lingvon. Kompreneble ankoraŭ ne troviĝis tia stultulo, kiu donus al ili ejon. Intertempe la leciono finiĝis. La gelernantoj komencis disiri, dume la helpantino de la instruisto kolektis ĉiujn aĵojn.



- Kiun lingvon vi instruas ĉi tie? – demandis Olo al la instruisto.
- Estas lingvo, por ke homoj de diversaj nacioj povu interkompreniĝi, – estis la respondo.
- Sed ĉu oni ne povas lerni lingvojn de aliaj popoloj?
- Lerni oni certe povas, sed perfekte ellerni ilin povas nur tre malmultaj, kiuj dediĉos al tiu lingvo la tutan vivon. Nia lingvo estas multe pli simpla, kaj ĉiu povas ĝin ekposedi dum mallonga tempo.
- Kaj povos esprimi per ĝi nur la plej primitivajn pensojn, – komentis la inĝeniero.
- Ĉu vi posedas nian lingvon, se vi tiel decide asertas?
- Eĉ la etan koncepton mi ne havas pri ĝi.
- Do, kial vi rajtas tiel diri?
- Sed estas ja evidenta afero! Krom tio via lingvo estas artefarita, mi aŭdis.
- Vi ĝuste aŭdis. Sed kio estas via profesio?
- Mi estas inĝeniero. Mi konstruas aŭtobusojn.
- Ĉu artefaritajn?
- Kion, kion?
- Mi demandas, ĉu vi konstruas la artefaritajn aŭtobusojn?
- Ĉu la aŭtobusoj kreskas sur arboj kiel pomoj?
- Do, ĉu vi opinias, ke la lingvoj kreskas kiel pomoj?
- Sed por la apero de lingvoj ekzistas natura vojo. Oni ne devas deflankiĝi de ĝi.
- Sed kial vi deflankiĝas de natura vojo de la movado?
- Mi ne komprenas vin.
- Ekzistas natura vojo por la movado de l' homoj – sur du piedoj. Por kio vi konstruas aŭtobusojn?
- Por pli rapide moviĝi kaj transporti pezaĵojn. La aŭtobusoj faras tion pli bone, ol homoj sur du piedoj.
- Ja ni ankaŭ same opinias, ke pere de la artefarita lingvo oni povas pli bone komunikiĝi, ol pere de la “naturaj”. Krom tio nia lingvo eĉ tre helpas en lernado de la naciaj, multe pli komplikaj lingvoj.



- Sed ĝi ja estas, vi mem diris, ege simpla, do primitiva!
  - Ĉu vi ĉiam penas fari viajn aŭtobusojn pli komplikaj, kun pli da detaloj?
  - Certe ne! Male, ju pli simpla estas la konstruado, des pli longe ĝi funkcias, des pli fidinda ĝi estas en la funkciado, do, perfekta. Ni enmetas nur vere necesajn detalojn.
  - Do nia lingvo estis konstruita laŭ la sama principo.
  - Sed la lingvojn kreas tute spontane popoloj dum jarmiloj; ĉiu laŭ sia konsidero, ofte eĉ senkonscie enigas en ĝin ion! Kaj neniu faras indikojn, kiel krei la lingvon.
  - Ĉu vere? Nu, certe, veninte al via uzino, vi kunvokos laboristojn kaj diros al ili: jen estas al vi amaso da feraĵoj, bonvolu konstrui aŭtobuson. La indikojn mi ne donos, ĉar tio ne estas natura vojo por konstruado de aŭtobuso, bonvolu fari ĉiu laŭ sia konsidero. Kaj ne rapidu, ĉar rapide la aŭtobusoj ne estas konstrueblaj.
  - Kia stultaĵo! Ja lingvoj kaj aŭtobusoj estas tute diversaj aĵoj!
  - Al mi ŝajnas, ke ekzistas almenaŭ unu komuna eco – ambaŭ servas al homoj, por ke ili pli bone vivu.
- La inĝeniero ne tuj trovis la respondon.
- Sed kia estas neceso de tiu lingvo? – demandis Olo. – Ja oni povas komunikiĝi per iu nacia lingvo.
  - Pere de kia lingvo? – demandis la instruisto. Ĉu vi neniam aŭdis pri la Naciismo? Ĉu vi scias, kion ĝi faras kun la homoj? Ĝi elvokas en homaj animoj ĉion, kio ilin dividas, kaj levas tion kiel la plej gravan aferon. Unu el tiuj aĵoj, kiuj plej forte dividas la homojn, estas la lingvoj. Unu diras: akceptu mian lingvon kaj forgesu la vian. La alia diras: ne, vi forgesu la vian kaj akceptu la mian. La pli forta diras: se vi ne volas transiri al mia lingvo, mi vin mortigos. Kaj jen unu popolo iras subpremi kaj eĉ ekstermi la alian. Sed ni donas al ili la trian lingvon, kiu estas nenies propraĵo, kaj pro kiu oni ne devas batali. Oni povas hejme paroli iun ajn lingvon, sed en aliaj landoj oni jam ne altrudas sian lingvon, ĉar ekzistas la komuna, kiu estas krome la plej simpla kaj la plej perfekta. Tiel la sfero de la potenco de la Naciismo malgrandiĝas, ĉar malaperas unu kaŭzo el tio, kio dividas la homojn.
  - Sed kial vi ne instruas en lernejoj, antaŭ bona tabulo, en bona klasĉambro? Kial vi ne uzas lernolibrojn?
  - Ĉar oni ne donas al ni ejon, ne eldonas por ni lernolibrojn kaj vortarojn. Ni disvastigas niajn librojn kvazaŭ en antaŭpresa epoko – simple reskribas ilin.

- Evidente via perfekta lingvo ne meritas troan fidon.
- Ĉar gvidantoj de ĉiu granda nacio esperas, ke ili sukcesos altrudi sian lingvon al la aliaj popoloj, aŭ ke ili akceptos ĝin propravole, malgraŭ la potenco de la Naciismo. Ni batalas kontraŭ la Naciismo, dum la Naciismo en animoj de la homoj batalas kontraŭ ni.
- Estas tre interese, – diris Ela al la inĝeniero. – Jen estas la alia maniero batali kontraŭ la Naciismo.
- Bagatelo, – estis la respondo, – naiva revo, nereala fantazio. Ĝi ne meritas la atenton.
- La samon oni diras ankaŭ pri via laboro.
- Nu, estas granda diferenco. Nia laboro kondukas al la reala celo, dum tio... estas vera stultaĵo.

\* ARDES, Bonifatio Tornado (Boris Tokarev, 1927–1994), Impeto, Moskvo, 1996.

Nia Solvo al La Akrostiko en La Decembra Numero de Inter Ni:

D	i	a	l	e	k	t	O				
O		m		a		R					
K	o	l	o	m	a	N					
U		l		u		l	I				
M	a	n	u	s	k	r	i	p	T		
E	k	s	p	e	r	i	m	e	n	t	O
N	e	a	n	d	e	r	t	a	L		
T	r	o	g	l	o	d	i	t	O		
O	r	a	n	g	u	t	a	n	G		
J	u	p	i	t	e	r	O				

Refoje dankon al Marjorie Boulton